

Kiu scias, ke mi amas ŝin?

Frazoj de knabo-esperantisto

INKA-ume scias qiu,
help-ho-ume scias chiu,
help-iks-ume scias cxiu.
Fundamente scias ĉiu...:

mi xin amas help-inka-e,
mi shin amas help-ho-ume.
Fundamente: mi ŝin amas.

Mi ŝin amas kun ĉapelo,
ŝi sin amas sen capelo.

Sed interkonsento eblas,
kiam mia koro feblas

Glosoj:

INKA-umi, inkaumi: uzi, skribante, la Internacian Ne-Kontraŭfundamentan Alfabeton, prezentitan de Otto HASZPRA. Vd. ekz. Haszpra, O. Pri: alternativaj alfabeto de Esperanto (elektronika manuskripto)

help-ho-umi: uzi, skribante, la Zamenhofan help-alfabeton

hel-iks-umi: uzi, skribante, la ikso-konvencion

qiu, chiu, cxiu – ĉiu

xi, ŝi, sxi – ŝi

capelo – mi ne scias, kio ĝi estas, sed eble temas pri *ĉapelo*.

febli – esti malforta, esti febla (neologismo)

(sekvontpaĝe vi trovas pliajn klarigojn)

Klarigo

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof unue informis pri sia Lingvo Internacia en la jaro 1887, en broŝuro (libreto), kiun nun esperantistoj kutime nomas la Unua Libro.

La Unua Libro enhavis multon (enkondukon, klarigon de la gramatiko, vortekvivalentojn) en la lingvo **rusa**, sed ĝi enhavis ankaŭ modeltekstojn en Esperanto. Ankaŭ en la malgranda, unufolia vortaro, fine de la Unua Libro, oni trovas vortradikojn Esperantajn (kun rusaj ekvivalentoj).

Jam en la Unua Libro Zamenhof uzadis la Esperantan alfabeton, kun pluraj literoj ĉapelitaj: *Ĉ, ĉ; Ĝ, ĝ; Ĥ, ĥ; Ĵ, ĵ* kaj kun litero por duonvokalo (*Ŭ, ŭ*). Tamen Zamenhof enkondukis ankaŭ surrogatan alfabeton kun literoj *ch, gh, jh, hh*, por okazoj, kiam presejo ne havas la necesajn ĉapelitajn literojn.

Ĉirkaŭ la jarmilŝanĝo (antaŭ kaj post la jaro 2000) Esperanto forte disvastiĝis en la elektronika reto. Pro neekzisto aŭ neposedo de jamaj teknikaj ebloj, la plimulto de la ret-uzantaj esperantistoj ektaĵpis kaj taĵpadas uzante diversajn surgatojn de la ĉapelitaj literoj. Tiun, provizore iom ĥaosan situacion prezentas la supra lude poemeca simpla teksto kun la celo aldoni iom al la konoj de kursanoj pri „historio de la apliko de Esperanto”.

Tre detale kaj ekzakte studis la Esperantan kaj planlingvan skribohistorion Otto HASZPRA, kiu plurajn surgatajn sistemojn trovas allaseblaj, kaj kiu substrekas ekonomiecon de la surgata sistemo nomata INKA.

La **Fundamenta alfabeto** (kies bonecon ankaŭ Otto HASZPRA emfazas), enhavas ĉapelitajn literojn ... plu

Neologismo estas vorto, kiu ne estas parto de la Fundamento de Esperanto: novvorto. Nuntempe ekzistas jam malnovaj neologismoj kaj diverse novaj aliaj neologismoj.

Fundamento de Esperanto, kiun oni akceptis solene en 1905, enhavas la sekvajn verkojn:

Fundamenta Gramatiko el La Unua Libro (1887)
Ekzercaro (1884)
Universala Vortaro (1884)